Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 11 Novembro, 2011

Kara Leganto, sufiĉe interese pasis la lasta kunveno, eĉ – mirakle – ni ekvidis ege junan komencanton, Salomonon, kiu dum 2 monatoj memstare sufiĉe bone ekposedis nian karan lingvon kaj dum la "Ŝtona" prezentado komprenis pr. trionon. Gratulojn!

Do, la lasta kunsido estis dediĉita al la ŝton-kolekto de la "Chicago Tribune" kaj s-no Les' esprimis ideon pri memoro en la ŝtono de E-o (legu suban artikolon).

La sekvanta kunveno estos elekta, eble, nin vizitos la ĈD de UEA en Nepalo, se iu pretas veturigi lin de la norda ĉirkaŭurbo, bv telefoni al 773-344-2276. Koran dankon.

Dum la lasta kunsido 6 (!) societanoj subtenis proponon elekti d-ron L. Kordylewski por la posteno de ESdŜ-prezidanto (proponis V. Pajuk), ankaŭ forestinta s-ro G. Dolgin esprimis preton subteni s-ron Leszek. Espereble, ankaŭ alia membro faros la samon aŭ (ili rajtas fari tion) proponos alian personon. Ni ja loĝas en demokrata lando. –La Redakcio

Tutmondo Ŝikage

La novgotikstila domego, konstruita en 1922 jaro je 425 N. Michigan Avenue, estas hejmo ne nur de la plej populara ŝikaga gazeto, sed ankaŭ de la loka TV oficejo de CNN kaj WGN radio. La turo de "Chicago Tribune" posedas sur siaj muroj interesan, internacie gravan vidindaĵon – la unikan kolekton de ŝtonoj venigitaj de la tuta mondo. Ĉiun ŝtonon akompanas subskribo, tiel la kolekto fariĝas originala geografie-historia ekspozicio. La kolekton iniciatis la fondinto de "Chicago Tribune", kolonelo McCormick, kiu famiĝis pro la militaj sukcesoj en Eŭropo. Li alportis la unuan ŝtonon de la detruita (fare de germanoj) katedaralo en Ypres, Francio. Poste vojaĝemaj ĵurnalistoj alportadis brikojn de la historiaj konstruaĵoj kaj aliajn memorŝtonojn de diversaj famaj lokoj por enmeti ilin en la murojn de la impona, nubskrapanta turo. De dekoj da landoj oni alportis pli ol 150 da pecoj de la mondfamaj temploj kaj konstruaĵoj kiel Trondheim, Taj Mahal, Clementine Hall, Partenono, Hagia Sofia, Palaco de Westminster, Alamo, Notre Dame, tombo de Linkolno, Independence Hall, Fort Santiago, Angkor Wat, Ta Prohm, Banteay Srey, Piramido de Ĥeopso, la Granda Ĉina Muro kaj la Berlina Muro. Krom ĉiuj ŝtatoj de Usono, la ŝtonoj devenas de tiel foraj lokoj kiel Eŭropa Unio, Panamo, Turkio, Ukrainio (legu sube), Japanio, Koreio, Ĉinujo, Jordanio, Egiptujo, Hindujo, Kambodio, Antarktiko...

Les kaj la edzino Anna

Unu ŝtonon (vd la apudan foton de la aŭtoro de ĉi-teksto Leszek Kordylewski kun la edzino Anna ĉe la fragmento de la antikva pola reĝa kastelo Wawel en Krakovo, Pollando) de nia naskiĝurbo oni enmetis en la ornaman ĉefenirejan pordegon de la turo por honorigi la multnombran polan komunumon de Ŝikago. En la apuda fenestro troviĝas fragmento de la luna roko, kolektita de la usonaj astronaŭtoj de sur la Luno. En la tura vestiblo estas videbla ŝtono de la naskiĝloko de Kristo, Betlehemo. Laste oni aldonis savitan ferpecon de la Monda Komerc-Centro (World Trade Center), detruita en Novjorko. En la eksteraj muroj oni ankaŭ fiksis rokojn de la historiaj batalkampoj kaj famaj naturparkoj, kiel Yellowstone kaj Petrified Wood.

La kolekto daŭre kreskas, ĉar la spaco ankoraŭ abundas sur la limŝtona surfaco de la turo. Domaĝe, mankas tie iu ajn memoraĵo, ligita kun nia internacia Esperanto-kulturo. La E-ista reto povus nature kontribui al la variigo de la internacia ŝtonaro. Ĉu io de la tombo do Nia Majstro, D-ro Zamenhof, meritus aldonon al la ŝikaga juvelaro? Eble taŭgus fragmento de la briko de la Centra Ofcejo de UEA en Rotterdamo? Ĉu iu alia ideo? La ĝemelaj urboj de Ŝikago nepre devas esti ĉi tie reprezentataj per ŝtonoj.

–Leszek Kordylewski

Tutmondo Ŝikage (II), Ukrainio

D-ro Kordylewski menciis konstruaĵon en Ukrainio, eron de kiu estas prezentata sur la Tribun-muraro: Orkupola monaĥejo de la St. Mikaelo. Ĝi hav(i)as riĉegan (ne ĉiam feliĉan) historian, kiel mia patrujo Ukrainio mem. Juĝu mem. La monakejo troviĝas sur la dekstra (orienta aŭ eŭropa) bordo de Dnipro rivero. Origine konstruita en 1050j far nepo de Jaroslavo la Saĝa – Izjaslav la 2-a, kies kristana nomo estia Dimitro, la monaĥejo havas la nomon de la St. Dimitro. Sed post duoncent jaroj lia filo Svjatopolk rekonstruis preĝejon, donante al ĝi nomon de sia patrono – ĉefanĝelo Mikaelo. Eble tio okazis post la venko de la princo super nomadaj hordoj de kupĉakoj, ĉar ĉefanĝelo Mikaelo estis patrono de armeo.

Post 1240 la monaĥejo estis serioze domaĝita de mongolaj triboj, kiuj forrabis la kupol-oron. Nur en 1496 la monaĥejo estis restarigita kaj oficiale ricevis la titolon de la St. Mikaelo. En XVI jarcento monaĥejo fariĝis unu el la plej grandaj en Ukrainio, 1620– ĝi fariĝis sidejo de renovogota ortodoksa Kijiva mitropolio.

La noveca historio scias nomojn de nuntempaj "mongoloj"– bolŝevistoj. La lastaj en 1922 nuligis la monaĥejon, malgraŭ la fakto, ke tiam agis pli ol 200 monaĥoj (vd foton – monakejo antaŭ la detruo). Post kelkaj jaroj la samaj fiaĉuloj ruinigis la katedralon, sonorilturon, kaj aliaj konstruaĵoj – ili ja bezonis lokon por prokomunismaj domegoj. Vere, estis organizita speciala komisio por ekzameni valoron de la monaĥejo, sed nur unu scienculo – d-ro Mikola Makarenko, rifuzis signi la "ruinig-verdikton", ke la arkitektura ensemblo havas neniun historian valoron.

Komence de 1990 jaroj la Ukraina Ortodoksa Eklezio ekkolektis monsubtenon por la renovigado de la katedralo. Fine de 1995 prezidento de Ukrainio ukazis daŭrigi renovigajn laborojn je la elspezo de la ŝtato. La sonorilturo estas la unua, kia aperis maje (1998), benita de la Patriarĥo Filareto. Nur en 2004 registaro de la "frateca" Rusio decidis transdoni al Ukrainio freskojn, forrabitajn dum multaj centjaroj. Dankon! *–V. Pajuk*

Viniskosmo Detruita per Fajro

En la nokto inter la 18-a kaj 19-a de septembro okazis granda incendio en la ejo de Vinilkosmo, la plej granda eldonejo kaj vendejo de Esperanto-muziko, situanta en Donneville apud Tuluzo en Francio. Estis detruita granda parto de la stoko de sondiskoj kaj la sonsistemo de Vinilkosmo. Laŭ unuaj informoj, la tuta neeldonita sonmaterialo de Vinilkosmo estis detruita. La ĉefrespondeculo de Vinilkosmo, Floréal Martorell, rakontis pri la okazaĵo en retletero, ke la ekzercejo 7, kie ekzercis tri rokaj bandoj, kaj la stokejo de Vinilkosmo/EUROKKA (kie estis la sonsistemo, materialo por la studio, kaj la plej granda parto de la stoko de la K-diskoj de Vinilkosmo) estis detruitaj pro incendio.

-Libera Folio

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

15an de Novembro – reelekta kunsido, gravaj organizaj demandoj kaj planoj por la estonta agado estos pridiskutataj, bv prepari prelegetojn

18an de Decembro – Zamenhofa Tago '11 sur la Ŝuista placo de la Malnova urbo (Cobbler Square, 1350 N Wells St., Old Town), kiel kuirarto estis elektita mediteranea, de Jordanio, ĉefurbo de kiu estas ĝemelurbo de Ŝikago